



Kongreso de la Popoloj

Pri strukturado

Kongreso de la Popoloj havas sian devenon el Brusela kunveno okazinta komence de majo 1963, kun la partopreno de 43 tutmondistaj organizaĵoj. Rezultis el tio « **Komitato por Kongreso de la Popoloj** » kiu kondukis la naskiĝantan institucion ĝis la Pariza sesio en 1977, post la 5a balotelektado. Ĉio pli malpli bone funkciis ĝis 1998, 10a balotelektado. Poste okazis dormeto ĝis 2003. En marto 2003 la Diĵona kunveno, prezidita de Henri Cainaud, revigligis la « komitaton por Kongreso de la Popoloj » kaj kunvokis la Parizan sesion en oktobro 2003.

1. Pariza sesio en oktobro de 2003

Tiu sesio aspektas kiel vera refondo de Kongreso de la Popoloj, kiu integris la tutmondistan civilan socion per la voĉdonado de la 26a de oktobro 2003. La tutmondista civila socio ĉiam estis asociita en la laboroj kaj sesioj de Kongreso de la Popoloj.

De tiam Kongreso de la Popoloj konsistas el du branĉoj :

- La *Elektita Delegitaro*
- *Forumo*, kiun ni nomis « *Konsultiĝa Asembleo* » (aŭ ASKOP) nun kun 110 organizaĵoj aliĝintaj al la « ĉarto » de ASKOP.

Ĉiu branĉo havas sian propran « reglamenton ». Tamen la reglamento de Kongreso de La popoloj inkluzivas ASKOP kaj organizas ties prezidantecon (artikolo 10.2). La du branĉoj estas do intime ligitaj kaj nedisigeblaj.

La funkcioj ne estas samaj :

- ASKOP (la Forumo) prezentas rekomendojn, resoluciojn, ktp...
- La Delegitaro, kiu estas investita de la aŭtoritato donita de la balotelektoj (artikolo 21-3 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj) difinas la juron.

Marc Garcet, instiginto de tiu direktiĝo precizigis tion - kio estas raportita en la protokolo : « *la asembleo estos leĝopropona kaj Kongreso leĝodona, kaj la asembleo povas kolekti la subtenojn de la interesiĝantaj asocioj* ». Kaj sub alia vidpunkto : « *Kongreso de la Popoloj, kiu estas skizo de la estonta Monda Konstitucia Asembleo, estas celo, kies rimedo estas la asembleo* ».

Jen kial le statuto de ASKOP estas interna al

Kongreso de la Popoloj kaj ke ĉiu sesio de Kongreso de la Popoloj de tiam necesigas la partoprenon de ASKOP. Ĉi lasta estas fakte multe pli ol kreado de Kongreso de la Popoloj : **ĝi estas, pro la voĉdono de la 26a de oktobro 2003, nedisigebla de la institucio, la kondiĉo mem de ĝia ekzisto, kondiĉo de la valideco de ĉiu sesio.**

2. La rajteco de Kongreso de la Popoloj

La jura referenco de Kongreso de la Popoloj estas la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Tiu deklaro ne estas konvencio aux internacia traktado, sed nekredible aŭdaca ago de ĝiaj verkintoj por anonci la ekaperon *sur la socia kaj internacia nivelo* de « *ordo tia, ke la rajtoj kaj liberecoj difinitaj en ĉi tiu deklaro povas esti plene realigitaj* » (artikolo 28a). Tiu 28a artikolo ehas la 3an alineon de la enkonduko, kiu asertas kiel *esenca, ke la homaj rajtoj estu « protektataj de la leĝo »*. Tiu ordo estos bazita sur « *la volo de la popolo* » kiel fonto « *de la aŭtoritato de la publikaj povoj ; tiu volo estu esprimita per regulaj kaj aŭtentikaj elektoj ...* » (Artikolo 21-3). Ankaŭ estas skribite en tiu Deklaracio, ke la aplikigo de la homaj rajtoj okazos nur per la volo de « *ĉiu individuo kaj ĉiu organo de la socio* » (alineo 8a de la enkonduko)

Tiu deklaro ricevis la subskribon de *191 ŝtatoj, kiuj tiamaniere antaŭagnoskis la rajtecon* de organizo fontonta el la monda popolo por la aplikigo de la esprimitaj rajtoj kaj liberecoj.

Tio firmigas la netipan juran statuson de Kongreso de la Popoloj : rajteco donita de voĉdonoj, kaj antaŭaprobata de la ŝtatoj dum ilia aliĝo al la ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj al la aldonitaj dokumentoj, el kiuj la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj.

Kongreso de la Popoloj estas regata de « Reglamento », kiu entenas la tri komponantoj priskribitaj en la Deklaracio : « ordo » rajtigita per « voĉdonadoj » kaj bazita en sia laboro per la partopreno de « ĉiu individuo kaj ĉiu organo de la socio » (Konsultiĝa Asembleo)

3. La Komitatoj por Kongreso de la Popoloj.

Tiu nova ekzisto de Kongreso de la Popoloj povas konkrete elvolviĝi nur se ĝi sin apogas sur ekzistantaj strukturoj laŭ lokaj leĝaroj : la servoj de bankoj, asekuroj, organizantoj de kongresoj, sekureco, ktp. povas esti postulataj nur se la organizaĵo estas konforma al la leĝoj de la lando, kie okazas evento.

Tial, jam en 1963, la 23an de majo, estis konsistigita Komitato por Kongreso de la Popoloj. La ĝenerala ideo estas, ke tiaj Komitatoj konsistiĝu en ĉiuj landoj, kie tio estas necesa aŭ ebla. La principo estis adoptita de la ĉeestantaj delegitoj dum la sesio de Kongreso de la Popoloj okazinta en Braziljo en majo 2009, kaj tion raportas la protokolo.

Nun ekzistas nur unu « Komitato por Kongreso de la Popoloj » : tiu fondita la 23an de majo, daŭre ekzistanta. Laŭ la statuto tiu komitato konsistas el reprezentantoj de la tri branĉoj : du Delegitoj al Kongreso de la Popoloj (aŭ komisiitaj de ĝi), du

reprezentantoj de Mondcivitana Registrolibro (aŭ de filiigita Registrocentro), du reprezentantoj de la Konsultiĝa Asembleo

4. Kiel la financoj estas organizitaj ?

Kiam oni komprenis la aspektojn pri rajteco kaj pri rekonado de Kongreso de la Popoloj same kiel pri la subtenoj, kiuj organiziĝas ĉirkaŭ ĝi, la organizado de la financoj aspektas simple. Prie la Brazilja sesio de Kongreso de la Popoloj konfirmis la jenan skemon :

- Tie, kie Komitato por Kongreso de la Popoloj ekzistas laŭ la landa leĝo, banka konto estas malfermita. La pagoj venantoj de «ĉiu individuo kaj ĉiu organo de la socio » povas esti faritaj je la ordono de Kongreso de la Popoloj.
- La multobligo de tiuj subenkomitatoj estas dezirinda. Tamen, manke de tia komitato, la monsumoj pagitaj por Kongreso de la Popoloj estas prefereble senditaj en landojn, kie ekzistas tia banka konto, por esti enmetitaj en tiun konton.
- La Delegito al la Financoj, *elektita de la Plenuma Komitato de Kongreso de la Popoloj* regas la globan buĝeton tiamaniere disponigitan al Kongreso de la Popoloj.

Notoj

NB 1 : Kongreso de la Popoloj estas memstara institucio organizita per « Reglamento ». Tiu Reglamento estis adoptita dum la Pariza sesio en julio 1977 ; ĝi estis publikigita en la libro « Kongreso de la Popoloj ». Tiu Reglamento estis modifita dum la Pariza sesio en oktobro 2003. La nuna versio de la Reglamento estis adoptita per voĉdono dum la Lieĝa sesio en novembro 2007.

NB 2 : La nova strukturo de Kongreso de la Popoloj estas fakte simila al la strukturo de « Esperanta Civito » en Ĉaŭdefono, kies unu el la fondintoj estas Giorgio Silfer en junio 2001. La Parlamento de Esperanta Civito konsistas el du branĉoj : la « Senato », elektita organo, kaj « Forumo » konsistanta el 33 organizaĵoj aliĝintaj al la « pakto » de Esperanta Civito. Tiu organigramo de Esperanta Civito estas do ĝuste tio, kion Giorgio Silfer kaj Marc Garcet proponis al Kongreso de la Popoloj la 26an de oktobro 2003, kaj kio estas adoptita.

Septembre de 2012